

LA 5A INTERNACIA SIMPOZIO

ESPERANTO - DISVOLVADO DE HOMAJ PERSONEKOJ EN LA ETAPO DE LA JUNAĜO KAJ LA TRIA AĜO – EDUKSISTEMOJ

La 24an de majo 2019 en Vroclavo, en la Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj - Vroclava Akademia Centro okazis **dulingva la 5a Internacia Simpozio**. Preparis ĝin kune la **Eŭropa Centro de Interkultura Edukado** kaj la **Konfucea Instituto en Vroclava Universitato**. Ĝia temo estis *Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo de la junaĝo kaj la tria aĝo – Eduksistemoj*. Komence oni planis organizi la simpozion kune kun chinaj prelegantoj, sed pro multaj kialoj bedaŭrinde oni ne sukcesis realigi la planon. La organizantoj devis rapide trovi pozitivan solvon de tiu malfacila situacio des pli, ke la simpozion **financis parte Vroclava Universitato**. Ĉiuj lastmomente invititaj prelegantoj plenumis sian taskon altnivele. Tio montras, ke veraj **esperantistoj ĉiam helpas unu la alian**.

La Honoraj Patronoj de la simpozio estis Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS), Tomasz Janoś - la direktoro de la Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj, prof. Bohdan Aniszczuk - la prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo, prof. dr hab. Adam Jezierski - LM Rektoro de la Vroclava Universitato.

La publikon bonvenigis Małgosia Komarnicka, la prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj Monika Sochacka, la direktorino de la Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj. Laborlingvoj de la simpozio estis la pola kaj Esperanto kaj interpretis Małgosia Komarnicka.

Laŭvice prelegis Stefan MacGill – Universala Esperanto-Asocio (Novzelando – Hungario) - *Junaĝo kaj la Tria Aĝo en la E-movado*; Małgosia Komarnicka - Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / adjunkto de AIS San-Marino (Pollando) - *AIS - Altlernejo plejparte en Esperanto*; prof. Christer Kiselman – Upsala Universitato (Svedio) - *Lingvo kaj scio*; Svetlana Pogorelaja – UTA Kijów (Ukraino) - *Aldoni ĝojon al la vivo - dank' al Esperanto*; Tomasz Janoś – Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj (Pollando) - *Vroclava Akademia Centro*; Johann Pachter (Germanio) - *Eduksistemo en Germanio en la jaro 2019*; dr Walentyna Wnuk – la konsilantino por Problemoj de Pliiĝuloj, ĉe la Prezidanto de Vroclavo (Pollando) - *Universitato de la Tria Aĝo kiel ekzemplo de la efektiviĝo de la ideo de dumviva homa disvolviĝo*.

Dank'al subteno de Vroclava Universitato **estis impone presita** kaj bindita *Simpozia Kajero nr 5*, kiu entenas la simpoziajn prelegojn kaj fotojn kun biografietoj de la prelegantoj.

Ĉijara **simpozio estis ege fruktodona**, ĉar ne nur la organizantoj ricevis monsubtenon de la neesperantista medio, sed neesperantistaj instancoj estis tre malfermaj por daŭrigi la kunlaboron. Finante la 5an Internacian Simpozion neesperantistoj substrekis, ke por ili estis granda plezuro aŭskulti la prelegojn en la lingvo Esperanto, kiu scipovas transdoni ĉiujn niuancojn de la homa penso. La konsilantino por Problemoj de Pliiĝuloj, ĉe la Prezidanto de Vroclavo entuziasme konstatis, ke jam de aŭtune ĉi-jare oni devas **enkonduki Esperanton en ĉiun Universitaton** de La Tria Aĝo en Vroclavo.

En la urbo Vroclavo estas 10 Universitatoj de La Tria Aĝo. Ni do ne povas plenumi ĉi tiun taskon, ĉar **mankas bone edukitaj kaj diplomitaj instruistoj**. En ĉi tiu situacio malfacile estas kompreni, ke profesorino Ilona Koutny, gvidantino de tri-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj ĉe la Poznana Universitato Adam Mickiewicz ĉiujare baraktas kun manko de studentoj. Ŝi eĉ havas problemojn gajni studentojn por unujara instruista trejnado.

Feliĉe, **estis eldonita bona Esperanto-lernolibro** „Sukceso per Esperanto” de Edward Malewicz. Nun jam mankas nur altedukitaj instruistoj kaj ni povas ŝanĝi la bildon de Esperanto kiu bedaŭrinde ofte ankoraŭ estas perceptata kiel malmoderna kaj eĉ arkaika kreaĵo.

Je la nomo de la organizantoj

Małgosia Komarnicka

La prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl